der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

14. Jahrgang | Nr. 87 (1/1978) | 30 Pf

Kontraŭ la neŭtrona bombo

La Monda Packonsilantaro lanĉis mondvastan kampanjon kontraŭ la planita produktado de la neŭtrona bombo en USONO. Intertempe NATO decidis, lokigi tiun novan amasneniigilon en Eŭropo.

La larĝan protestkampanjon kontraŭ tiu nova diabla elcerbaĵo de la militemaj imperiistoj, la malamikoj de la homaro, ankaŭ partoprenas la esperantistoj de GDR.

De distriktaj renkontiĝoj laste i. a. el Halle, Suhl, Berlin, Dresden kaj de unuopuloj nin daŭre atingas protestrezolucioj.

Ankaŭ Centra Laborrondo dum sia lasta plenkunsido, la 4an de decembro 1977 en Magdeburg, akceptis protestdeklaron kaj sendis ĝin al la Packonsilantaro de GDR:

Erklärung

Im Namen der im Kulturbund der DDR organisierten Esperantisten wenden wir uns voller Empörung und mit tiefer Abscheu gegen die von den USA geplante Herstellung der Neutronenbombe.

Die Produktion dieser neuen Massenvernichtungswaffe, die von den Vereinigten Staaten zynisch als sogenannte „saubere" Waffe hingestellt wird, soll das Wettrüsten weiter anheizen und ist eine ernsthafte Bedrohung des Weltfriedens. Wir fordern die Ächtung der Neutronenbombe, die Vernichtung aller Kernwaffen und anderer Massenvernichtungsmittel.

Wir fordern den Verzicht auf Gewaltanwendung in den internationalen Beziehungen.

Die Mitglieder des Zentralen Arbeitskreises Esperanto im Kulturbund der DDR.

Ĉeklaro

En la nomo de esperantistoj, organizitaj en Kulturligo de GDR, plenindigne kaj kun profunda abomeno ni kontraŭas la planitan de USONO produktadon de la neŭtrona bombo.

La produktado de tiu nova amasmortigilo, prezentita de USONO cinike kiel tiel nomita „pura" armilo, havas la celon plue eskaladi la vetarmadon kaj estas serioza minaco de la monda paco.

Ni postulas la malpermeson de la neŭtrona bombo, la detruon de ĉiuj nukleaj kaj aliaj amasmortigaj armiloj.

Ni postulas la rezignon je apliko de potenco en la internaciaj rilatoj.

La membroj de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR.

Amadou-Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de UNESKO

Kiel ni anoncis en „de" 5/77, p. 14, la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, faris gravan paroladon dum la inaŭguro de la 62a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjavik.

Ni prezentas lian paroladon:

Sinjoro prezidanto,
Gekongresanoj,
Gesinjoroj,

Vi elektis, gesinjoroj kongresanoj, okazigi vian kongreson pri la temo „Rajto je komunikado". Tio estas temo, kiu interesas Uneskon pro pli ol unu kialo, ĉar komuniki ja estas interkompreniĝi.

Unu el la plej esencaj taskoj de Unesko, laŭ ĝia statuto, estas la plifortigo de la mondpaco, la komprenemo inter la popoloj kaj la kunlaboro inter la nacioj. Esperanto historie fondas el la sama principo. D-ro Zamenhof, entuziasma inventinto de tiu lingvo, estis profunde ĉagrenita dum sia juneco pro la apartiĝoj, kiujn la diverslingveco povis kaŭzi en la sino de komunumo. Li konvinkiĝis, ke nur la ebleco de senpera komunikado povus revenigi la pacon inter la homoj, kaj, ke estas necese krei universalan lingvon sufiĉe kompletan, neŭtralan kaj alireblan por ĉiu homo. Esperanto, li diris, ne konas nacion malfortan aŭ fortan, privilegiitan aŭ malsuperan.

La revo pri universala lingvo aperas do kiel esprimo de idealo — vidi, dank' al la uzo de komuna lingvo, forigon de ĉiuj malakordoj inter la homoj.

Hipotezon pri artefarita lingvo jam en la 17-a jarcento menciis Descartes kaj precipe Leibnitz, kiu tra sia admiro al „Ars Magna" de Raymond Lulle reprenis projekton ligitan, en la komenco, al la ideo de filozofia alfabeto kiel ĝi evoluis en la Oriento. La ardo per kiu la eminenta logikisto Louis Couturat defendis Esperanton atestas pri la interesiĝo, kiun tiu demando levis inter la filozofoj kaj la sciencistoj.

Tamen, se la serĉado de internacia lingvo konkretiĝis en la logika lingvo, tra kiu esprimiĝas la nunaj sciencaj fakoj, Esperanto trovas sian fonton, empirie, en la ekzistantaj lingvoj, precipe la latinidaj kaj ĝermanaj, kiujn, cetere, ĝi ne pretendas forigi. Ĝi aspiras fariĝi **helplingvo,** kiu, aldone al la naciaj lingvoj, kiuj esprimas la penson kaj la specifajn valorojn de ĉiu popolo, ofertus al la homaro la eblecon disponi pri komunikilo utiligebla almenaŭ en unu tuta regiono. La sciencistoj, kiuj neniam ĉesis kuraĝigi per sia subteno aŭ partopreno la evoluigon kaj disvastiĝon de Esperanto, daŭre substrekis la **helpan** karakteron de tiu rimedo de komunikado. Al tiu alianco de logiko, modesto kaj fervoro, Esperanto ŝuldas la fakton, ke ĝi estas inter la multnombraj projektoj de internacia lingvo tiu, kiu havigis al si la historian sperton plej daŭran, kio ne estas ĝia malplej granda merito.

Tamen. la tiel grava lingva problemo estas nur unu el la aspektoj de la komunikado.

Pro tio, Unesko okupas sin en longdaŭra agado, kiu, trapasante la klarigon pri la koncepto de la komunikado, celas transformi la praktikon por fakte ebligi al ĉiuj la rajton je komunikado.

Dum sia dekoka kunsido, en 1974, la Ĝenerala Konferenco de Unesko ŝarĝis min studi, en konsulto kun la ŝtatoj-membroj kaj la profesiaj organizaĵoj, la koncepton de la rajto je komunikado.

En la momento kiam oni pli kaj pli konstatas la fundamentan gravecon de komunikado en demokrata socio, kaj kiam la grandskalaj progresoj de la scienco kaj tekniko malfermas gigantajn eblojn al la homoj, la strebo al nova ordo en la mondo koncernas samgrade la komunikadon kiel la ekonomiajn, sociajn, kulturajn aferojn. Hodiaŭ oni komencas rekoni la valoron de kultura pluralismo kaj la gravecon por la monda kolektivo konservi la kulturan integron de ĉiu popolo. La emfazo pri kultura identeco, bazita sur la rekono de la specifeco kaj egaleco en digno de ĉiuj kulturoj, ne malpermesas fruktodonajn rilatojn. Estas, male, per kontaktoj kaj interŝanĝoj, ke la diversaj kulturoj riĉigas unu la alian. Do, kiel atingi tion, dum la ebleco komuniki ne estas je dispono de ĉiuj, individue kaj nacie? Jen la graveco de plena realigo de la rajto je informado, proklamita en la artikolo 19 de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

Ĉar ne temas nur pri garantio al la popoloj de la ebleco aliri kaj utiligi la komunikrimedojn: temas ankaŭ pri certigo de plena reciprokeco de la informfluoj interne de la sama nacio aŭ sama komunumo, kaj ankaŭ inter ĉiuj regionoj de la mondo. Komunikado estas dudirekta procedo, kiu implicas la eblecon informi kaj informiĝi.

Por garantii kaj la liberecon kaj la ekvilibron de la cirkulado estas esence ke la diversaj partneroj, sinsekve elsendantoj kaj ricevantoj, disponu pri rimedoj, kiuj ebligas veran dialogon.

La nuna malegaleco en la posedo kaj uzado de la informaj rimedoj konsistigas do defion tutmondan kiu ne povis lasi Uneskon indiferenta. Efektive, ĝia statuto devigas favorigi la konatiĝon kaj la reciprokan komprenemon inter la nacioj, donante sian helpon al la amasaj informiloj kaj tiucele rekomendante tiujn internaciajn kontraktojn, kiujn ĝi juĝas utilaj por faciligi la liberan cirkuladon de ideoj per vortoj kaj bildoj.

Unesko tial ofte intervenis por adoptigi serion de normoj internaciaj. Ĝi donas sian helpon al la ŝtatoj-membroj, kiuj volas ellabori nacian politikon pri komunikado. Sed Unesko nek havas, nek povas havi specifan politikon pri komunikado, kiun ĝi trudus al la ŝtatoj-membroj je nacia nivelo. Tiuj elektas la vojon, kiu ŝajnas plej konforma al la propraj aspiroj. Tio, kion Unesko povas fari por ilin helpi, estas instigi la diskutadon, favori interŝanĝon de spertoj kaj kun ili difini la vojojn, kiuj plifortigos la internacian kunlaboron.

Unu el la gravaj stadioj en tiu agado de efektiva alproksimigo inter la popoloj estas la organizado de regionaj konferencoj pri la komunikadpolitikoj. En San Jose (Kosta-Riko) dum la unua el tiuj konferencoj, okazinta en julio 1976, kun partopreno de reprezentantoj de la latinamerikaj kaj karibaj landoj, la „rajto je komunikado“ troviĝis en la kerno de la diskutoj. Okazis ja debatoj riĉaj kaj kompleksaj, ĉar temis pri relative nova koncepto, kiu esprimas la novajn dimensiojn, kiujn la evoluado de la tekniko kaj de la ideoj donis al la koncepto pri la rajto

je informado, proklamita en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj de 1948. La partoprenantoj adoptis unuanime la „Deklaracion de San Jose“, kiu substrekas, ke „La homoj havas la rajton aliri ĉiujn kulturajn riĉaĵojn kaj partopreni, en libera kaj demokrata maniero, en la diversaj esprimiĝoj de la homa spirito“.

Fakte, la plena efektivigo de la rajto je komunikado, se ĝi garantias la aliron kaj partoprenon de la popolo en la komunikado, devas permesi ankaŭ kreskigi la sociemon de la homo, kuraĝigi la kritikan pripensemon kaj precipe stimuli la individuan kaj kolektivan kreemon kiu estas unu el la kondiĉoj por evoluado.

Dum 1975, Unesko faris ĉe la ŝtatoj-membroj internacian enketon pri la rajto je komunikado. Tre riĉaj pro la diverseco, la respondoj montris grandan konverĝon de la ideoj. Ĝenerale, oni rekonis la respondecon kaj la devojn de la medioj vidalvide al la socio kaj la gravecon de la aliro je informado kaj la efektiva uzado de la rajto informi kaj informiĝi. Estis ankaŭ substrekite, tamen sen ŝovinismo, ke oni devas konservi la integrecon de la kulturoj kaj ke estas nepre necese por ĉiu lando diskonigi siajn opiniojn kaj esti aŭdata je internacia nivelo.

Estas superflue diri, ke la problemoj tiel levitaj tute ne estas simplaj. Pro tio, Unesko klopodas samtempe pli bone difini la sencon kaj la implicojn de la rajto je komunikado, tiel kiel ĝi estas perceptata en malsamaj kulturoj kaj sociekonomiaj sistemoj, kaj precipe favori grandskalan debaton kaj studojn pri la tuta tiurilata problemaro.

Historia kaj kultura perspektivoj, ekzameno de la teknologiaj implicoj kaj la filozofiaj, juraj kaj politikaj aspektoj, influo sur la socio, nuna stato de la informkanaloj kaj formulado de politikoj pri komunikado —— tiuj ŝajnas esti kelkaj el la esencaj demandoj, kiujn oni devas plustudi por pli bone kompreni la problemon de la rajto je komunikado.

Pro tio, en la kadro de sia longdaŭra studprogramo, Unesko volas intime kunlabori kun ĉiuj siaj ŝtatoj-membroj, kun naciaj, profesiaj kaj universitataj institucioj kaj kun la neregistaraj organizoj por kuraĝigi ĉie la pristudadon kaj la diskutadon.

Multaj studoj viciĝas en tiu programo. Ili temas pri:

—— studo de la rolo kaj procedoj de komunikado en la socio kaj la internacia cirkulado de la informoj;

—— agadoj eksperimentaj pri la evoluigo de komunumaj medioj, plibonigo de la aliro al la informkanaloj kaj ekipaĵoj de la medioj;

—— pristudo de iniciatoj destinitaj garantii la homajn rajtojn;

—— la antaŭenigo de libera kaj ekvilibra interŝanĝo de informoj, de politikoj, de infrastrukturoj kaj de la edukado rilate la komunikadon;

—— pristudo de la perspektivoj de la komunikado inter nacioj kaj la koncernaj malhelpoj, konsiderante precipe la uzadon de novaj teknologioj kiel radiodissendo per satelitoj.

Unesko estas do devigita, pro la komuna volo de siaj ŝtatoj-membroj, okupiĝi pri konsideroj, kiuj tuŝas la radikon de unu el la grandaj problemoj de la nuna mondo: krom tiu de informado, estas la problemo ebligi al la homoj **komuniki.** Ĉar oni povas esti „informita“ kaj tamen ne „komuniki“, kaj kelkaj esploristoj eĉ subtenas la tezon, ke en la kazo de la industriaj landoj ĝenerale ju pli oni „konsumas“ informojn des malpli oni vere komunikas kaj des pli oni bezonas komuniki.

Post la entreprenita esploro pri la tuto de la problemoj pri komunikado en la moderna mondo, Unesko esperas vidi la realigon de interkonsento pri tio, kio devas esti la celo kaj la kialo de la komunikado en la mondo kaj pri la rimedoj per kiuj la internacia komunumo povus kreskigi sian agadon por fari el la komunikado rimedon unuarangan por progresigo de la popoloj kaj kompreno inter la nacioj.

Gekongresanoj, la celo, kiun via kongreso alprenas, diskutante pri la rajto je komunikado, pri la obstakloj al la apliko de tiu rajto, precipe la lingvaj baroj, estas do en la kerno de la nuntempa problemaro de la mondo

Ĉar dum la obstakloj al universala cirkulado de la penso kaj de la ideoj ĉiam ekzistis, la komunikado inter popoloj kun diversaj lingvoj kaj kulturoj ĉiam ŝajnis esti idealo eminente dezirinda kaj atinginda. Hodiaŭ ĝi montriĝas kiel necesa en mondo kie senĉese emfaziĝas la interdependo de ĉiuj homoj. La emfazo pri liberaj pensado kaj esprimo estas nepre fundamenta, sed ni devas ankaŭ krei sen ia diskriminacio la kondiĉojn, kiuj ebligas tion.

Gesinjoroj, ĉiuj lingvoj estas egalaj je digno kaj kiel iloj de komunikado, eĉ se ekzistas diferencoj pri la skalo de ilia disvastiĝo. Se neniu el ili estas nature mondskala, ĉiu reprezentas propramaniere sperton, realigon, unikan paŝon de la progreso de la homo. Tiel, en tiu ĉi tempo kiam ekzistas tiom da teknikaj eblecoj por estigi aŭ kreskigi la dialogon inter la homoj, *ili devas pripensi la barojn, kiujn konsistigas la lingva diverseco kaj ankaŭ la rimedojn por venki tiujn barojn .*

En 1974, studo de Unesko montris la ekstreman malabundon de esploroj pri la transkultura komunikado kaj la obstakloj, kiuj kontraŭas la evoluigon de tiu komunikado: kulturaj diferencoj, psikologiaj baroj malebligantaj la komprenon, *manko de komuna lingvo,* k. t. p. Dum la pasintaj jaroj, la debato pri komunikado transkultura tiom pliintensiĝis kiom kreskis la ebleco de rekta dissendo trans la landlimoj. En la kerno de la debato troviĝas la konsciiĝo pri la fakto, ke komunikado estas potenco. Kelkaj eĉ asertas, ke ĝi estas „**la** potenco". Regi nacian sistemon de informado povas ebligi al certaj interesoj influi la procedon de decidpreno en la socio, eĉ influi la kulturajn kaj politikajn valorojn kiuj firmigas ĝian unuecon. Tio subskribas ankoraŭfoje la gravecon de la temo, kiun vi debatos.

Permesu al mi fini, reprenante ideon, kiun mi esprimis en la lasta ĝenerala konferenco de Unesko lastan novembron en Nairobi. Temas pri la graveco, kiun havas, kun perspektivo al la transformigo de la rilatoj inter nacioj, informado, kiu agnosku laŭ ekvilibra maniero la poziciojn de ĉiuj partneroj.

La demando pri informado estas nun aktuala. Ŝajnas, ke ĝi restos tia dum la venontaj jaroj ĉar ĝi estas intime ligita al tiu rajto je komunikado, kiu, por esti plene uzata en la kadro de kunlaboro sur egala bazo inter la nacioj, necesigas la rekonon de la rajto je kultura diverseco.

Sinjoro prezidanto,
Gekongresanoj,

mi certas, ke estas samtempe tiu respekto al la kulturaj diversecoj kaj tiu deziro je internacia alproksimiĝo, kiuj vin motivas. Estas pro tio, ke mi deziras tre sincerajn bondezirojn por ke la laboroj de via kongreso estu kaj fruktodonaj kaj pozitivaj.

Esperanto en Bulgario

Antaŭ sep jardekoj areto de entuziasmuloj metis la fundamentan ŝtonon de Bulgara Esperantista Asocio. Sed la ĝermoj de Esperanto aperis en nia lando jam en la jaro de ĝia naskiĝo. Antaŭ la fondiĝo de BEA estis eldonitaj lernolibroj, aperadis Esperantaj revuoj. Estis efektivigita kunlaboro kun balkanlandaj esperantistoj. Post la Unua mondmilito en Bulgario eskreskis forta laborista Esperanto-movado. Aperis novaj Esperantaj gazetoj kaj verkoj de bulgaraj proletaj aŭtoroj. En 1935 jaro laboristaj esperantistoj aliĝis al BEA. Depost tiu tempo la Esperanto-movado en nia lando estas unueca.

Antaŭ la popola venko en 1944 j. BEA apogis sin nur sur la ŝultroj de sindonemaj esperantistoj, kiuj oferis tempon kaj monon por propagandi la internacian lingvon. Nun ĉe la kondiĉoj de la popoldemokratia ŝtato Esperanto-movado estas subtenata morale kaj materiale. BEA havaş 250 lokajn, fakajn kaj uzinajn societojn en 144 urboj kaj vilaĝoj kun pli ol 6 mil membroj.

BEA agas ĉefe en du direktoj. La unua — poresperanta. Per ĝi ni celas rejunigon de la organizaĵo pere de la juna generacio. Ĉiujare centoj da junaj laboristoj, studentoj kaj lernantoj vizitas kursojn. Oni lernas la lingvon por kontakti kun samaĝuloj kaj samfakuloj el proksimaj kaj malproksimaj landoj. Tiu intereso al aliaj landoj kaj popoloj baziĝas sur la fakto, ke nialanda junularo estas edukata en spirito de socialisma patriotismo kaj internaciismo. Ĝi arde simpatias al ĉiuj popoloj, kiuj batalas por sociala progreso, konstruas novan sociordon kaj kontribuas por la paco sur la tero.

Por daŭre ligi la novajn esperantistojn al nia movado, ni konigas al ili la historion de Esperanto en nia lando, rakontas pri la unuaj apostoloj kaj pri la esperantistoj ,pereintaj en la antifaŝista batalo. Ni klarigas la rolon de Esperanto kaj Esperanto-movado nuntempa, la utilon kaj la ĝojojn, kiujn la lingvo alportas al tiuj, kiuj ĝin uzas.

Kompreneble, ne ĉiuj studintaj la lingvon, fariĝas membroj de BEA. Certa parto de ili forlasas la kursojn antaŭtempe pro malaltkvalita instruado. Jen pro kio BEA, ties instrufako, rekomendas por kursgvidantoj profesiajn instruistojn. Por ilia lingva spertiĝo jam ĉirkaŭ dek jarojn funkcias korespondaj kursoj por instruistoj de Esperanto en Meden Rudnik apud urbo Burgas ĉe Nigra Maro. Okazas ankaŭ tutlandaj semajnaj kursoj komence de januaro kaj aprilo. Ekde la kuranta jaro ni aranĝas pedagogiajn regionajn konferencojn, kiuj celas vigligon kaj plibonigon de la instrulaboro. Aperas ankaŭ bulteno, destinita por la kursgvidantoj.

Grava akiraĵo de BEA estas la Internacia kursejo en Pisanica, kiun partoprenas ankaŭ alilandanoj. Ili lernas, perfektiĝas en Esperanto kaj ĝuas belajn pejzaĝojn de Rodopa montaro. Por tiuj kursoj oni konstruas domon kun 200 litoj.

Bulgara esperantista kooperativo konstruis en la sino de Balkanmontaro propran ripozdomon, kie dum la someraj monatoj oni praktikas la lingvon.

Ankaŭ en Velingrad — la urbo, kiu portas la nomon de la esperantistino-heroino Vela Peeva, oni aranĝas ĉiujare feriadon, kie bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj perfektigas sian lingvan posedon.

Per tiuj ĉi aranĝoj BEA atingis bonajn rezultojn. Ni intencas plulabori en tiu direkto, ĉar tiel oni estigas bonajn kursgvidantojn kaj esperantistojn regantaj la lingvon.

Multaj amaskomunikiloj en okcidentaj landoj plej ofte misprezentas la vivkondiĉojn en nia lando. Tial la honeste pensantaj esperantistoj en Okcidento strebas al senperaj rilatoj. Ili informiĝas pri nova Bulgario el korespondaĵoj de nialandaj esperantistoj. En ĉiu numero de „Bulgara esperantisto“ oni trovas adresojn de dezirantoj korespondi, kio atestas pri vigla interŝanĝo de ideoj kaj sentoj de amikeco. La interesajn korespondaĵojn el alilando oni utiligas por letervesperoj, ekspozicioj kaj por la gazetaro. Ni ankaŭ zorgas konigi al la esperantistoj en fremdlando la realajn atingaĵojn de Popola Respubliko Bulgario pere de eldono de oficialaj dokumentoj. Pasintjare ni disvastigis la paroladon de la ĉefsekretario de Centra komitato de Bulgara komunista partio kaj ŝtatestro Todor Ĵivkov antaŭ la Tuteŭropa Konferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Helsinki kaj ĉijare la Raporton de CK de BKP antaŭ la dekunua kongreso de la partio. Ambaŭ broŝuroj trovis bonan akcepton en la internacia esperantista legantaro.

La bulgara teatra arto estas konigata al la mondesperantistaro pere de Bulgara Esperanto-teatro. Meritaj kaj popolaj aktoroj kaj kantistoj partoprenas la Universalajn kongresojn kaj per tio pruvas, ke Esperanto kapablas esprimi plej subtilajn pensojn kaj sentojn. Nun BET preparas sin pro la 63a UK en Varna.

BEA dediĉas specialan atenton al Mondpaca Esperantista Movado. Ĝi mongarantias la eldonadon de ĝia dumonata organo „Paco“ kaj la bulteno n „Pacaktivulo“ konsiderante, ke la paco estas supera bono por ĉiu homo, sendepende de liaj konvinkoj.

En la kadroj de BEA ekzistas pli ol dek sekcioj, kiuj uzas la internacian lingvon kiel profesikontaktigan rimedon. Iuj el la sekcioj kiel ekz. MEM, la poŝtista, agrarista, instruista faras utilan internacian laboron. La sekcio de sciencaj laboristoj eldonas revuon „Scienca Mondo“ — organo de Tutmonda Federacio de Sciencaj Laboristoj.

BEA apogas sin je la plej amasa en nia lando aŭtoritata organizo Patrolanda Fronto. BEA estas ĝia kolektiva membro. Multaj lokaj societoj laboras intime kun la bazaj organizoj de PF, peras korespondaĵojn inter ĝemelintaj urboj, aranĝas reciprokajn vizitojn k. t. p.

Per nia peresperanta agado ni celas ŝanĝi la sociopinion en nia lando favore al Esperanto. Samtempe niaj anoj penas esti en la unuaj vicoj de la konstruantoj de socialismo. La morala aspekto ludas gravan rolon. Nia nobla strebo estas superi la veteranojn, riĉigi la trajtojn de la bulgara esperantisto, ke li servu kiel ekzemplo de laboremo, patriotismo kaj internaciismo, modesta kaj fidela al sia patrolando, estimanta kaj laboranta por la bono de la homaro, por ĝia progreso kaj feliĉo.

Antaŭstaras la 63a UK. Esperantistoj el la tuta mondo esperas, ke ni organizos imponan kongreson. Ni laŭ sperto scias, ke okazigi internacian kongreson estas afero streĉa, postulas multon de ĉiu aktivisto. Ni faros ĉion eblan por sukcesplena kongreso, kiu donos novan puŝon al Esperanto-movado en nia lando.

Hristo Gorov
prezidanto de BEA

Informoj pri la UK en Varna

Kiel konate, Centra Laborrondo traktis kun la Vojaĝoficejo de GDR por organizi kongreskaravanon al la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varna. La Vojaĝoficejo ellaboris detalan oferton, kiun ĉiu interesito ricevos laŭ peto de CLE.

Intertempe ni eksciis pliajn detalojn pri la kongreso kaj la kongresurbo, kiujn ni sube prezentos.

1. La kongreslando kaj kongresurbo

Popola Respubliko Bulgario, okupanta teritorion de ĉ. 111 000 kv km kun loĝantaro ĉirkaŭ 8,5 milionoj, situas en la centro de Balkana Duoninsulo. Ĝian pejzaĝon karakterizas fruktodonaj ebenaĵoj, altaj montaroj, impete fluantaj riveroj kaj multaj grandaj kaj malgrandaj barajlagoj, konstruitaj dum la lastaj 30 jaroj. Oriente brilas la Nigra Maro. En sunoriĉa Bulgario abundas floroj, fruktoj kaj legomoj. El la bonodora rozo la bulgaroj delonge produktas la tutmonde faman rozoleon.

Suferinta dufoje multjaran fremdan jugon (bizancan — de 971 — 1186 kaj otomanan — de 1396 — 1878). Bulgario ĝis la Dua Mondmilito estis unu el la plej postrestintaj en Eŭropo landoj, precipe kun primitiva agrikulturo. Nuntempa Bulgario estas industri-agrikultura lando. Ĝia vilaĝmastrumo estas grandbiena kun kooperativa kaj ŝtata sektoroj, alte mekanizita. En la lando disvolviĝis propra peza industrio — metalurgio, maŝin- kaj ŝipkonstruado, energetiko, kemio k. a. Evoluis la kulturo, arto, scienco kaj tekniko.

La ĉefurbo estas Sofio kun ĉ. 1 000 000 da loĝantoj. Aliaj grandaj urboj: Plovdiv, Varna, Ruse, Burgas, Pleven k. a.

Varna, la perlo de Nigra Maro, konata de la antikva epoko, estas preskaŭ kvaronmiliona moderna havenurbo, kiu impete kaj ĉiuflanke kreskas kaj pliboniĝas. En ĝi estas teatro, operejo, simfonia orkestro, kvin superaj kaj multaj duonsuperaj kaj mezaj lernejoj. Nepre vizitindas la akvario kun interesaj vivantaj marestaĵoj, la arta galerio, la arkeologia, mara, etnografia kaj aliaj muzeoj. En la ĉirkaŭaĵo de la urbo abundas vidindaĵoj: la ĉarmaj ripoz- kaj kuraclokoj Zlatni Pjasaci (Ora Strando), Druĵba (Amikeco), Albena, Kamĉija k. a. kun multaj modernaj hoteloj kaj kampadejoj, la mirinda naturfenomeno „Pobiti Kamani“, la enhakita en rokoj Alaĝa Monaĥejo (de la 13a jc.), la maŭzoleo de la pola reĝo Vladislav Varnenĉik, urbo Balĉik kun plaĉa orientstila palaca komplekso (nun ripozloko por intelektuloj), la Internacia Domo de la Sciencistoj, la Internacia Ripozdomo de Ĵurnalistoj k. m. a.

La gastama Nigra Maro disponigas al la homo sian bluan vastaĵon kaj agrablan akvon (temperaturo en julio — aŭgusto 20 — 25°), sian riĉan faŭnon kaj senĉese viciĝantajn larĝajn kaj longajn plaĝojn kun pura etgrajna sablo.

Per siaj naturbelaĵoj kaj kulturmonumentoj Varna kaj ĝia ĉirkaŭaĵo altiras ĉiujare centmilojn da gastoj el la tuta mondo. Ĝi allogas la vizitanton ree kaj ree veni ĉi tien por ripozi aŭ kuraci sin, por ĝui belecon kaj neforgeseblajn travivaĵojn.

2. Provizora programo

Kunsidoj de la komitato kaj Estraro de UEA – Ĝeneralaj kunvenoj de UEA – Kunvenoj de fakaj organizaĵoj, landaj asocioj, delegitoj de UEA – Internacia ekzameno – Belartaj Konkursoj – Internacia Somera Universitato – Teatraj prezentoj – Bulgara Vespero – Filmprezentoj – Internacia Arta Vespero – Solena Inaŭgura – Interkona Vespero – Bankedo – Balo – Ekskursoj – Konversaciaj Rondoj – Solena fermo – Diservoj – Seminarioj.

La kongresejo funkcios en la salonoj de la Palaco de Sporto kaj Kulturo. Ĝi estas konstruita sur 42 000 kv m da surfaco. Situas tre proksime al la marbordo kaj ties parko, senpere al la ĉefa aŭtostrado kondukanta de Varna al la fame konataj strandoj Zlatni Pjasaci (Ora Strando) kaj Druĵba (Amikeco). La kongresejo disponas pri multaj grandaj kaj malgrandaj salonoj, bufedoj kafejoj. akceptejoj, ripozejoj k. a. – ĉiuj klimatizitaj. En la kongreshalo estas pli ol 5000 sidlokoj. La Palaco de Sporto kaj Kulturo prezentas interesan atingaĵon de la moderna bulgara arkitekturo. Ekstere ĝi similas al grandega ŝipo. Laŭ la ĝenerala sekretario de la Monda Organizo de Arkitektoj la Palaco estas „fantazia kombinaĵo el penso, betono kaj aluminio".

3. Kongreskotizoj

Kongreskotizoj validaj ĝis la dato:

(en bulgaraj levoj)	77. 12. 31	78. 3. 31	78. 6. 20	78. 8. 5
1. Kongresano ne membro individua de UEA	40	44	48	55
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro	35	39	43	50
3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo „Esperanto"	27	31	35	42
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio I	28	31	34	41
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3	25	28	31	37
6. Junulo ĝis inkluzive 20jara	12	14	15	21
7. Universitata studento ĝis inkluzive 30-jara	20	22	24	31
8. Blindulo	16	18	20	26

4. Kondiĉoj kaj instrukcioj

- La kongreskotizo inkluzivas la partoprenon en la kongresaj aranĝoj sed ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, veturkostojn aŭ bankedon.
- Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj de la kotizoj validas la dato de la pago.
- La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto poste ne partoprenas la kongreson. Se iu pagas aliĝkotizon por alia persono, li antaŭvidu tion.

Informoj pri la Junulara Kongreso

1. La urbo Veliko Târnovo

Veliko Târnovo estas unu el la plej malnovaj kaj belaj urboj de Bulgario. Ĉi tie estas konservitaj valoraj monumentoj de la bulgara historio kaj kulturo el XII-a – XIV-a jc. En la piedoj de monteto „Trapezica“ troviĝas la historia preĝejo „Sankta Dimitro“, kie en 1185 la fratoj Asen kaj Petâr proklamis la ribelon de la bulgara popolo kontraŭ la bizanca jugo. De tie komenciĝas la historio de la Dua Bulgara Ŝtato.
Veliko Târnovo estiĝis ĉefurbo. Sur la monteto „Carevec“ la bulgaraj reĝoj konstruis grandiozajn palacojn kaj preĝejojn. Ĉi tie koncentriĝis la politika kaj kultura vivo de la tuta lando. La krutegaj bordoj de rivero Jantra kaj la altaj fortikaĵmuroj faris la urbon nealirebla. Veliko Târnovo konservis multnombrajn monumentojn de la kulturo kaj arto el tiu epoko. Multe da eventoj el la plej nova historio de la bulgara popolo estas ligitaj kun la urbo. Post la liberiĝo el la otomana jugo (1878 j.), ĉi tie en 1879 kunsidis la unua fonda popola kunveno, kiu akceptis la unuan konstitucion de Bulgario. Kun la nomo de la urbo estas ligita ankaŭ la formiĝo de la socialisma movado en Bulgario.
Sed Veliko Târnovo ne estas nur historio. Ĝi estas ankaŭ moderna urbo kun vastaj parkoj kaj bulvardoj, kun sunaj loĝejoj kaj publikaj konstruaĵoj, kun grandaj industriaj entreprenoj.
Veliko Târnovo, atestanto de multaj eventoj dum la jarcentoj, atendas gastame la partoprenantojn de la 34a Kongreso de TEJO.

2. La ĉirkaŭaĵo de Târnovo

En la ĉirkaŭaĵo de Veliko Târnovo troviĝas multe da monaĥejoj, kiuj dum la tempo de la Dua Bulgara Ŝtato fariĝis centroj de vigla literatura vivo. Inter ili plej famaj estas la monaĥejoj Preobraĵenski kaj Drjanovski, unikaj pro siaj arkitekturaj ensembloj el pasintaj jarcentoj. Dum la epoko de la bulgara Renesanco (XIX jc.) la monaĥejoj estis azilo de la bulgaraj nacirevoluciuloj. En la ĉirkaŭaĵo de Veliko Târnovo troviĝas ankaŭ unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Bulgario vilaĝo Arbanasi – nun nacia rezervejo. Multaj domoj kaj preĝejoj en ĝi kun riĉaj internaj

---

- Kongresaliĝo ne estas transdonebla al alia persono.
- Kongresano en kategorio 1 (nemembro de UEA) ricevas la revuon Esperanto dum la tuta kalendara jaro, en kiu okazas la Kongreso.
- Kongresanoj en kategorio 2 kaj 3 de la kotiztabelo devas pagi la membrokotizon de UEA antaŭ aŭ samtempe kun la kongreskotizo.
- Kongresanoj de kategorio 7 (universitataj studentoj ĝis 30-jaraj) devas indiki sian naskiĝdaton kaj sendi kun sia aliĝilo oficialan ateston pri sia universitataneco.
- Kongresanoj en kategorio 8 (blinduloj) devas sendi kun la aliĝilo oficialan ateston de blindula organizaĵo aŭ de kuracisto. Gvidanto de blindulo rajtas aliĝi senpage sed ne ricevas kongresan libron.
- Infanoj malpli ol 13-jaraj rajtas aliĝi senpage, se samtempe aliĝas almenaŭ unu el la gepatroj. Infano ne ricevas kongresan libron.

Grava atentigo: bulgaraj esperantistoj ne rajtas pagi por siaj eksterlandaj amikoj kongreskotizojn, ekskursojn, bankedon, hotelon k. t. p.
Pri ĉiuj detaloj laŭ peto informos Centra Laborrondo.

Laŭ informoj el la Unua Oficiala Bulteno

dekoraĵoj, kreitaj dum la XVI – XVII jc. estas unikaj monumentoj de la bulgara arkitektura kaj arta heredaĵo.

3. Urbo de la 34a Kongreso de TEJO

Ĉe Veliko Târnovo altenleviĝas la historia monteto „Sveta Gora" de kiu malkovriĝas belega panoramo al la urbo. Sur tiu ĉi monteto troviĝas la universitato „Kiril kaj Metodi", studentaj loĝejoj, kluboj kaj kafejoj. Por la kongresanoj la universitato disponigos sian aŭlon kaj aŭditoriojn, konstruitajn konforme al arkitekturaj tradicioj de la urbo. Ĉi tie trapasos granda parto de la kongresa programo, kunsidoj de la laborgrupoj kaj de la Komitato, ĝeneralaj kunvenoj, amuzvesperoj k. a. La programo proponas ankaŭ unutagan ekskurson al vidindaj lokoj en norda Bulgario. Pli frue aliĝintaj havos la plezuron loĝi en la nova studenta domo ĉe la universitato. La aliaj estos loĝigitaj en la urbo. Tuj post la junulara kongreso okazos postkongreso en Varna dum la 63a Universala Kongreso de Esperanto. Post la kongreso en Varna la dezirantoj povos partopreni la 4-an internacian arkeologian laborbrigadon de la 5a ĝis 28a de aŭgusto, kie ili havos senpagan loĝadon kaj manĝadon aŭ resti ripoze ĉe Nigra Maro.

4. Aliĝo

Junuloj el GDR kiuj volas partopreni la kongreson sin nepre anoncu ĉe CLE por ricevi utilajn informojn. Krome oni organizos specialan seminarion por la partoprenontoj. La aliĝilo, kiu estas sendenda al la LKK de la 34a TEJO-Kongreso, 1000 Sofio, p. k. 587, Bulgario, devas enhavi jenajn indikojn: Nomo/antaŭnomo/Naskiĝdato kaj jaro/sekso (vira/ina) /lando/urbo kaj poŝta kodo/strato kaj numero/membro de TEJO/UEA (jes/ne)/postkongreso en Varna: 1/2/3/4/5/6/7 tagojn/partopreno en la arkeologia laborbrigado dum la tuta tempo: (jes/ne)/dato/subskribo/ (Bonvolu skribi la aliĝilon preslitere)

Partoprenantoj el la menciitaj landoj pagas en sia landa valuto laŭ la kurzo de la levo.

La dezirantoj postkongresi en Varna devas sendi kune kun la kotizo por la kongreso ankaŭ la kotizon por loĝejo en Varna por tiom da tagoj, kiom ili deziras resti en la urbo.

La partoprenantoj en la internacia arkeologia laborbrigado devas resti ĝis fino de la labortempo.

Atentu: bulgaraj esperantistoj **ne rajtas pagi** kotizojn por siaj eksterlandaj amikoj.

La aliĝiloj estos traktataj nur post ricevo de la kompleta pago.

Kotiztabelo por la 34a kongreso de TEJO (22.–29.7.1978 – Veliko Târnovo)
Individuaj membroj de TEJO/UEA/t. e. nur membroj malpli ol 26-jaraĝaj ĝuas rabaton de 5 levoj.

	ĝis 78. 2. 28	78. 5.31	post 78. 5. 31
	lv.	lv.	lv.
ĝis inkl. 20 j.	62	68	76
21 ĝis inkl. 25 j.	70	76	84
26 ĝis inkl. 32 j.	78	84	92
33 j. kaj pli	88	94	102

Kotiztabelo por loĝejo dum la postkongreso

tagoj	levoj	tagoj	levoj
7	28	3	12
6	24	2	8
5	20	1	4
4	16		

Esperanto - ideologio aú instrumento?

Nia malgranda senpretenda artikolo „Esperanto — instumento“, responde al s-ro Jaan Ojalo, en „der esperantist“ n-ro 79 (5/76) elvokis neatenditte grandan eĥon, ankaŭ internacie.

Pri tio ni tre ĝojas, ĉar evidente la tuŝita problemo estas grava. Pro tio ni volonte publikigas pluajn opiniojn.

Jen, kion skribas Aleksander Charkovski el Moskvo pri la temo:

ĈU ESPERANTO ESTAS NURA ILO ?

„Jes, ĝi estas instrumento kaj nenio plu“ asertas D. Blanke en sia tre interesa artikol-respondo al letero de J. Ojalo (Rigardu ambaŭon en la „der esperantist“ 5/1976). Fakte du samideanoj daŭrigas ardan disputon inter raciistoj kaj revuloj, kiu delonge balancigas nian verdan ŝipon. Vi certe memoras, ke mem Zamenhof minacis forŝiri de sia brusto la stelon, se lian verkon oni uzos senidee, nur por praktikaj celoj. J. Ojalo defendas kelkajn ideojn de Zamenhof, esprimitajn en „Esperanto en perspektivo“, aldonante, ke lin, Ojalo, persone allogas al Esperanto ne eblecoj „aĉetivendi varojn, pasigi babilante le tempon anstataŭ kartludi, sed pleje kaj primare pro tiu internaciisma atmosfero, kiun esperantistoj tien kunportas“ (Temas pri Esperanto-kongresoj).

Tiun modestan aserton Blanke renkontas kanone, ĉar por li la letero estas, ŝajne, longeatendata preteksto frakasi la „internan ideon“. Mi ne estas idea adepto de Zamenhof, tamen disputi mi intencas same kontraŭ mia amiko D. Blanke, ĉar ekstreme asertante ke Esperanto estas nura ilo, eĉ instrumento li faras tion, de kio nin avertis K. Marks — kune kun akvo alplaŭdi la infanon.

La asertoj de Blanke ŝajnas ne nur ĝustaj, sed eĉ nerefuteblaj, ĉar li sin bazas sur agnoskitaj principoj de marksismo. Dubon elvokas nur la aksiomo, kiu ĉion subtilas: „Esperanto estas nura lingvo kaj nenio pli“. De tio jam aŭtomate sekvas, ke ĉio ĝusta por lingvo nacia rilatas same al la lingvo internacia. Blanke preterlasas la konatan marksisman regulon pri transiro el kvanto al kvalito.

Nacia kaj internacia — ĉu diferenco estas nur en la prefikso? Sciencaj ideoj estas internaciaj (nur Hitler povis paroli pri germana fiziko), la scienco apartenas al la homaro, tamen kulturo estas ĉiam nacia — germana, rusa k. t. p. Kaj lingvoj — ili ĉiuj (krom Esperanto) apartenas al certa popolo.

Por strukturaj lingvistoj kaj kibernetikistoj lingvo estas simple sistemo, aganta kiel instrumento — ne gravas, ĉu ĝi estas homa aŭ maŝina. Tamen ili esploras nur unu el ĝiaj ecoj, same — la informan. Tamen lingvo ne estas nura instrumento, ilo. Ĝi estas fenomeno multflanka, kaj lingvon en ĝia tuto pli esprimas poetoj, sed ne sciencistoj, kiuj ne povas ne rigardi ĝin de unu el ĝiaj faskoj. Kaj kion diras elstaraj poetoj? Ili ofte substrekas la unuecon inter lingvo kaj kulturo, eĉ pli — inter la unua kaj la sorto de ĝia portanto. Dum tre malluma periodo de nia historio la granda rusa verkisto I. Turgenev kredis je hela estonto de sia popolo — li apogis sin sur la ecoj de la rusa lingvo. Ne povas esti, skribis li, ke tiu lingvo ne estas donita al vere granda (ruse: velikij) popolo. Nun eble oni akuzos tiun verkiston pro ia mistikemo — li vivis do en pasinta jarcento — sed kiel kompreni jenan verslinion de la fama soveta poeto Rasul Gamzatov: „I esli zavtra moj jazik isĉeznet, to ja gotov sevodnja umeretj“ (Kaj se morgaŭ mia lingvo formortos, mi pretas

jam hodiaŭ morti mem). Pro kio tiu zorgo pri malgranda avara lingvo? Ĉu ne pro tio, ke ĝi estas al la poeto gepatra, do la plej kara? Mi dubas, ke la ekzemplojn oni povas klarigi bazante sin sur principo: „Lingvo estas nura ilo". Ne, ne estas — nek nacia, nek internacia.

Ĉiu lingvo estas portanto de la nacia kulturo (Lenin substrekis, ke ekzistas du kulturoj en ĉiu kulturo), kaj rememorante, ke la germanan lingvon uzis kaj E. Thälmann kaj A. Hitler, ni nur ankoraŭ pruvigas la certecon de tiu eldiro. Kaj kion esprimas Esperanto? Ĉu vere ĝi estas same malvarma indiferenta ilo kiel alfabeto de Morse? Kun bedaŭro mi devas transiri al komparo kun lingvoj naciaj, ĉar alia vojo al pruvoj pri Esperanto dume mankas.

Mi ekzemplas. B. Pasternak brile tradukis „Faŭston" de Goethe, enspiris en ĝi rusan animon. Rusa kulturo ekposedis valorajon, tamen aliaj nacioj de tiu fakto gajnis nenion. Kaj kio okazadas, kiam bona Esperanto-poeto esperantigas (sukcese!) mondan ĉefverkon? Gajnas la tuta homaro, ĉar en potencio ĝi povos atingi kaj la cerbon kaj la koron de ajna terano — nur ellernu li Esperanton! „Pro kio Esperanto? — povas demandi iu flanka homo. — Se la sama „Faŭst" aperos en bona angla traduko, ĝin legos, ja, pli multaj. Tamen ĝis fundo ĝuos la verkon nur angloj kaj usonanoj, ĉar ekzistas limo por ekscipovo de ajna lingvo en eksterlando. Kaj nur Esperanton oni povas posedi kiel la gepatran lingvon".

Jes, kara Blanke, mi asertas, ke „Sinjoro Tadeo" de Grabovski aŭ „Infero" de Rosetti estas eroj de la internacia kulturo. Ne, internacia kulturo ankoraŭ ne ekzistas — pro tio pri ĝi ne parolis niaj grandaj marksistaj filozofoj. Tamen ĝi konstruiĝas jam kelkajn jardekojn kaj Esperanto estas lingva formo de tiu kulturo.

Tio estas dialektika proceso. La Esperanta „Infero" estas samtempe kaj nacia kaj internacia (simile pasternaka „Faust" estas kaj germana kaj rusa — tamen rusa ne nur laŭ maniero de esprimo, ĉar lingvo ne estas simple — robo, en kiu oni vestas fremdan verkon.).

Do esperantigante literaturaĵojn oni kreas eron de la estonta internacia kulturo. Faciligante kontaktojn inter ordinaraj homoj, kamparanoj kaj laboristoj, eĉ neprogresivaj samideanoj faras objektive progresivan laboron — proksimigas la belan estonton, kiam, laŭ profetaĵo de A. Puŝkin, „popoloj forgesos la malamikecon kaj unuiĝos en unu grandan familion".

Kompreneble la lingvo internacia ne estas sola kaj eĉ ne la unugrada forto, kiu movos la homaron laŭ la hela vojo al estonto. Tamen komunistoj ofte substrekas, ke la paco sur nia planedo ne povas esti sen interkompreno inter simplaj homoj — same tiuj, kiuj pli multe bezonas Esperanton — ĉar kia interkompreno sen simpla kompreno?

Finante mian artikolon, mi vidas, ke ĝi ne estas same scienca, kiel la via — eĉ male. Tamen sciencaj konkludoj venas post esploro de praktiko — kaj internacia kulturo kaj ĝia lingva esprimilo estas ankoraŭ junaj — por konkludoj tempo ankoraŭ ne venis. Tamen instrumenta aŭ ila flanko de Esperanto ne estas la sola substrekenda. Karl Marks skribis, ke revolucioj estas akuŝistinoj ĉe historio, kiam malnova sociordo gravedas por nova. Al mi ŝajnas, ke dume la homaro naskas mondan kulturon (Mi parolas pri homaro, kiu laŭ objektivaj socileĝoj proksimiĝas

al komunismo) kaj Esperanto almenaŭ faciligas tiun naturan proceson — kaj iam pro tio ĝia historia rolo estas vere revolucia.

Vi pravas, Blanke, ke ekzistas internaciisma sento eĉ sen lingva interkompreno — ekz. inter diverslandaj komunistoj. Mi povas aldoni, ke en tridekaj jaroj kelkaj germanaj „samideanoj" uzis Esperanton por faŝisma propagando. Tamen komunistaj kongresoj levis la demandon pri la internacia lingvo kaj Hitler ĝin kondamnis en „Mein Kampf".

Pruvas ne apartaj ekzemploj kaj provizoraj disoj, tamen historiaj tendencoj. Kaj la lastaj montros progresivecon de nia movado, ĝian kongruon kun komunismaj idealoj. Nia lingvo ne estas en tiu proceso indiferenta — agas ĝia demokratismo, internaciismo, kiuj apartenas al la plej fundamentaj ecoj de Esperanto.

A. Charkovskij

*

3-a Kunsido de CLE

La tria kunsido de CLE (post novelektoj en 1976) okazis la 3-an kaj 4-an de decembro 1977 en Magdeburg.

La plenkunsido omaĝis al la forpasinta prezidanto k-do Rudi Graetz kaj dankis al Helmut Fuchs pro longjara kunlaboro, kiu forlasis CLE pro malbona sanstato. Plue oni traktis la rezultojn de la 9-a Kongreso de Kulturligo, amplekse informis pri la signifoplena 62a Universala Kongreso kaj pri la 33a Internacia Junulara Kongreso kaj pritraktis problemojn lige al la partopreno de la kongresoj en 1978 en Bulgario. De speciala graveco estis ampleksa tagorda punkto pri la kunlaboro inter CLE kaj Pola Esperanto Asocio, Ĉeĥa Esperanto Asocio kaj Asocio de Esperantistoj de Slovaka Socialisma Respubliko. Partoprenis kiel gastoj: s-roj L. Koseniak kaj Malycha (PEA), d-ro F. Šatura kaj inĝ. Nemec (AESSR), s-roj J. Vitek kaj Z. Křimsky (ČEA).

Krome la plenkunsido akceptis la agadplanon por 1978 kaj aŭskultis amason da informoj kaj koncizaj raportoj.

La plenkunsido elektis kiel oficantan prezidanton de CLE k-don Rudolf Hahlbohm el Berlin. Rudolf Hahlbohm apartenas al la fondintoj de CLE, estis vicprezidanto kaj elstare laboris en la pasinteco en la pupteatra movado.

*

OFERTO POR LA KONGRESO

La Vojaĝoficejo informis CLE pri la eblecoj vojaĝi karavane al la 63-a UK de Esperanto. Ampleksan informleteron kun ĉiuj kondiĉoj petu senprokraste ĉe CLE. Nur tuja reago certigas eblecon de partopreno!



Aranĝoj omaĝe al la Ruĝa Oktobro

Fine de la pasinta jaro la esperantistoj en Kulturligo de GDR en multaj lokoj organizis renkontiĝojn por omaĝi al la 60a jubileo de la venko de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio.

Rimarkindaj estis i. a. tiuj en Stralsund, Berlin kaj Pirna, ĉar partoprenis ilin prof. S. N. Podkaminer el Leningrad (kp. „de" 6/77). En tiuj urboj prof. Podkaminer parolis emocie pri siaj memoroj el la malfacila tempo de la 900-taga faŝisma sieĝado de Leningrado, kie li kiel kolonelo estris la sepan fakon de la fronto, t. e. ideologia agado en la malamikaj vicoj kaj kunlaboro kun la Nacia Komitato Libera Germanio. En Stralsund (nia foto) la esperantistoj prezentis malgrandan deklaman programon. En Pirna elstaris la pola aktorino s-ino Gybczinska, kiu prezentis la monologan dramon „Marie Curie".

★

25 jaroj SET

La Somera Esperanto-Tendaro (SET) en Lanĉov (ČSSR), kiu lastjare okazis de 31. — 13. 8. 1977, festis jubileon: La 25an. Altnivelaj kursoj, interesa programo, agrabla esperantista medio kaj mirinde bela naturo karakterizas tiun internacie konatan ĉiujaran aranĝon, okaze kies jubileo kore gratulas CLE.

★

Ĉapitro de M. Isajev

En la ruslingva verko „Naučno-teĥniĉeskaja revoljucija i funkcionirovanije jazykov mira", Moskva 1977, estas ĉapitro de prof. M. I. Isajev sub la titolo „K propleme vspomogatelnogo iskusstvennogo jazyka v epoĥu naučno-teĥniĉeskoj revoljucii" (p. 69 — 72).

★

Aperis recenzo

Pri la soveta ruslingva interlingvistika verko „Problemy interlingvistiki" (kp. GDR-Paco 1977) aperis recenzo en la prestiĝa lingvistika revuo „Voprosy jazykoznanija" 4/1977, p. 143.

★

Riproĉeto de soveta korespondanto

Laŭ korespondanoncetoj en n-roj 81 kaj 82 mi sendis la 16an kaj la 18an de junio 8 (ok) leterojn, aldoninta po du bildkartojn. Forpasis 2 monatoj. Neniu respondis.
Se vi deziras korespondi, korespondu. Se vi ne deziras (tio estas via rajto) almenaŭ respondu mallonge.
G. M. Deĥterev, 612700 Omutninsk, Kirowskoj obl. Miliujskaja 35

Solvo de la traduka konkurso

Nian alvokon en „der esperantist“ n-ro 4/1977 partopreni tradukan konkurson sekvis 14 kuraĝuloj. Ili prezentis tradukojn ege diferencaj unu disde al la aliaj. Supozeble tiu surpriza diferenco klarigeblas el la fakto, ke la tradukenda teksto svarmis de maloftaj, specialaj vortoj. Sed ankaŭ gramatikaj eraroj troviĝis. Kvankam la nivelo de la tradukoj estis plejparte alta, ankaŭ la plej bonaj el ili ne estis tute senriproĉaj eĉ gramatike.

Tial, por ne publikigi eraran tradukon, ni rezignis pri la intenco publikigi la tradukon de la unua gajninto kaj anstataŭe donas sube la eksterkonkurencan tradukon de D-ro Karl Schulze, kiun li iomete tralaboris surbaze de la sugestoj el la laboroj de la konkursintoj, al tiu traduko ni aldonas per piednotoj eblajn tradukvariantojn. Do ĉiu konkursinto povas kompari kaj mem pritaksi la nivelon de sia traduko.

La plej bonajn tradukojn prezentis kaj libropremiojn gajnis:

1) Klaus-Dieter Dungert, Magdeburg
2) Michael Lennartz, Ludwigsfelde
3) Manfred Arnold, Berlin.

Koran gratulon al la gajnintoj, kiuj ricevis la libropremiojn per poŝto.

Kaj jen la tradukon kun piednotoj:

„Kion Lothar Berfelde kunigis[1]), plenigas la spachavajn[2]) ĉambrojn de la malsupra etaĝo. Sinjora ĉambro, ĉasĉambro[3]), buduaro fanfaronas[4]) per meblaro de ĉiuj imageblaj stiloj[5]) de historiismo, kiel neogotiko, neorenesanco, neobaroko.

Ju pli multe da afektitaĵoj[6]) des pli fieraj la posedintoj[7]); jen pro kio la spiralaĵoj kaj volutoj[8]) kaj konkaj ornamaĵoj, la tornitaj kolonetoj, surmetaĵoj, galerioj, leonaj kapoj, ĉiu ĉi duoble kaj trioble aplikita[9]) garnaĵo[10]) en kiu kaptiĝis la polvo. La valoro de la Mahlsdorf-a kolekto rezultas el[11]) la kompleteco; estas montrate[12]), kion ajn burĝa gusto ĉirkaŭ la komenciĝo de la jarcento[13]) opiniis lasta ŝiko. La petrola lampo sur la lampotablo, la riĉe ornamita stovo[14]), la kranktelefono surtabla kaj surmura[15]), la gaslustro, metalkadraj[16]) bildstariloj[17]) kun brunetaj fotoj de honorindaj[18]) geedzaj paroj, vazetoj kaj glasetoj kaj tasetoj, vitraj pendaĵoj kaj oleopentraĵaĉoj kaj kompreneble la funela gramofono kun surmetita disko[19]): „Harema nokto, ludita de la Bohemia-orkestro. Kun refrenkantado[20])“.

Piednotoj

1) kunportis, kolektis; 2) vastajn, grandspacajn; 3) ĉastrofea ĉambro, porsinjora ĉambro*; 4) pavas, pompas; 5) stilnuancoj, stilvariaĵoj, arabeskoj*; 6) afektaĵoj, afektitaj detaloj; 7) (t)iamaj posedantoj (uzante la vorton „posedintoj“, oni ne bezonas la vorton „(t)iamaj“; 8) helicaĵoj; 9) surmetita; 10) ornam(aĵ)o; 11) montriĝas en, troviĝas en, kuŝas en; 12) estas montrata tio ĉio, oni montras (tion), ĉion . . . Uzante la tekstvarianton oni devas nepre atenti la adverban formon de la predikativo; 13) jarcentoturn(iĝ)o; 14) forno; 15) por tablo kaj muro, en surtabla kaj sumura variantoj (aŭ formoj); 16) metale kadritaj (aŭ: enkadrigitaj); 17) starigiloj; 18) estimindaj, honestaj; 19) kun disko sur ĝi; 20) rekantado.

* propono de L. Knöschke

Profesoro Viktor Falkenhahn - 75-jara

La internacie konata lingvisto profesoro d-ro Viktor Falkenhahn el Berlin fariĝis 75-jara, la 11-an de februaro 1978. Kiel multklera poligloto kaj lingvosciencisto, okupiĝanta i. a. pri slavaj kaj baltaj lingvoj, pri la hebrea, egipta, ĉina, finnougraj, afrikaj kaj aliaj lingvoj, li speciale grave kontribuis ekde 1948 al la evoluo de la polonistiko kaj lituanistiko (litova lingvo kaj literaturo) en GDR. Li verkis monografiojn kaj studojn pri la litova kaj pola lingvoj. Ĉijare eldoniĝos litovaj fabeloj en la germana traduko de la jubileulo.

Profesoro Falkenhahn, vasthorizonta, milda kaj modesta homo, ankaŭ energie subtenas la sciencan agadon de esperantistoj, estante estro de la fakgrupo interlingvistiko/esperantologio ĉe CLE kaj ofte prelegante ĉu antaŭ sciencaj rondoj ĉu antaŭ ĝenerala esperantista publiko. Konataj estas liaj ampleksaj studoj en „der esperantist“ 18/19 (januaro 1968) kaj 59/60 (junio-oktobro 1973) Centra Laborrondo kore gratulas al sia eminenta membro dezirante sanon, bonfarton kaj ankoraŭ multe da fruktodona kunlaboro.

CLE

(kp. Wiss. Zeitschrift der Humboldt-Universität, gesellschaftswiss.-sprachwiss. Reihe, Nr. 1/1963, p. 107 – 109)

★

Interlingvistiko en Rumanio

Rumanio En la universitato de Timiŝoara prelegis prof. D-ro Ignat Bociort en aprilo pri „La nuntempa scienco kaj la ideo pri nova lingva ordo en la mondo“. Ĉeestis grandnombra universitata publiko. Tio estis la tria manifestiĝo en ĉi tiu universitata jaro. — En la universitato de Bukareŝto fondiĝis Esperantologia Rondo. Malfermiĝis Esperanto-kurso.

(Informilo de IEMW, 3/1977)

Membroj de CLE eksterlande

— Internacia junulara seminario pri la temo „Esperanto en la servo de la junularo“ okazis 9. — 13. 2. 1977 en Nidzica/Pollando. Ĝi estis organizita de la Socialisma Asocio de Polaj Studentoj (SAPS) kaj la Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK). La seminarion partoprenis *Rita Krips* kaj *Renate Schütt,* Junulara Komisiono.

— De 26. — 28. 3. 1977 en Budapest okazis landa delegita konferenco de Hungara Esperanto-Asocio, kiu elektis novan estraron de HEA. La konferencon partoprenis *Linde Knöschke* kaj *Siegfried Linke.* Elektiĝis nova prezidanto.

— La tradicia hungarlanda Junulara Esperanto-Renkontiĝo ĉijare okazis de la 3-a ĝis 5-a de aprilo en Györ. Kiel gastoj de la Junulara Komisiono partoprenis *Ingrid Erfurth* kaj *Marita Dörner.*

— En Wladyslawowo ĉe Gdynia okazis la 2-an kaj 3-an de aprilo 1977 plenkunsido de la Estraro de Pola Esperanto-Asocio. Pri aktualaj problemoj de la agado de esperantistoj en GDR prelegis *Rudi Graetz* kaj d-ro *Detlev Blanke.* Estis subskribita la jarprotokolo 1977 al la Kontrakto inter PEA kaj CLE.

Dum la plenkunsido estis elektita nova estraro de PEA. Prezidanto fariĝis la docento ĉe la Varsovia Universitato, d-ro *Marian Dobrzynski.*

— De 4. — 6. 6. 1977 en Bydgoszcz/Pollando okazis la festotagoj de Bydgoszcz 77, en kies kadro ankaŭ estis okazigita esperantista aranĝo. Ĝin partoprenis s-ino *Hella Sauerbrey.*

— En la kadro de mezlernejana esperantista tendaro ĉe Szolnok/Hungario okazis de 19 — 25. 6. 1977 junulara seminario pri problemoj de esperantista junulara agado, ĝin partoprenis el GDR *Michael Lennartz.*

— La kongreso de Asocio de Esperantistoj de Slovaka Socialisma Respubliko (AESSR) okazis de 6. — 9. 5. 1977 en Bratislava. Ĝin partoprenis pli ol 400 esperantistoj, inter ili eksterlandaj gastoj. CLE reprezentis *Rudi Graetz* kaj *Hans Heinel.*

— La 62-an Universalan Kongreson de Esperanto de 30-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 1977 en Rejkjavik/Islando partoprenis el GDR la prezidanto de CLE *Rudi Graetz* kaj la sekretario de CLE d-ro *Detlev Blanke.* (Kp. la raporton en „der esperantist“ 6/1977)

— Partoprenis la seminarion „Paco — Esperanto — Studentaro“ de 10. — 13. 11. 1977 en Poznan *Renate Lewin.* La seminario estas organizita de la Socialisma Asocio de Polaj Studentoj (SAPS) kaj ties Pola Studenta Esperanto-Komitato.

— La III-an Internacian Foiron de Esperanto-Turismo, tutsemajnan vojaĝon tra la ĉefaj turismaj lokoj de Pollando, partoprenis en novembro *Rudolf Hahlbohm.* La aranĝon organizis Monda Turismo, „Juventur“ kaj la Turisma Centro de PEA.

Internaciaj aranĝoj en Hungario 1978

D: Dato, O: Organiza Komitato, A: Adreso

Junulara Esperantista Renkontiĝo en Zalaegerszeg

D: 29. 4. – 1. 5. 1978
O: Teritoria Komitato de HEA
A: H–8901 Zalaegerszeg, Pf. 263

Zamenhof Internacia Pacmarŝo en Börzsöny

D: 12. – 14. 5. 1978
O: Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA
A: H–1443 Budapest, Pf. 153

16-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula

D: 2. – 8. 7. 1978
O: TIT – SEU
A: H–5701 Gyula, Pf. 73

11-a Internacia Renkontiĝo Naturamika en Abaliget

D: 17. – 26. 7. 1978
O: Teritoria Komitato de HEA
A: H–7601 Pecs, Pf. 2

7-a Varia Internacia Semajno en Budapest

D: 15. – 21. 8, 1978
O: Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA
A: H–1443 Budapest, Pf. 153

8-a Vintra Esperantista Ferio en Budapest

D: 27. 12. 1978 – 2. 1. 1979
O: Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA
A: H–1443 Budapest, Pf. 153

★

IFER '78

Leipzig-a Laborrondo Esperanto invitas vin partopreni en la Internacia Foira Esperanto-Renkontiĝo 1978, kiu okazos la llan kaj 12-an de marto 1978.

Pli detalajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe: Kulturbund der DDR, Leipziger Arbeitskreis Esperanto, IFER '78, DDR–701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Straße 115.

★

Grava dokumento

UNESKO eldonis kunlabore kun UEA en Esperanto la gravan dokumenton „Rekomendo pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj", akceptita de la Ĝenerala Konferenco, 18-a sesio, 19-an de novembro 1974 en Parizo. La dokumento enhavas 45 artikolojn.

Esperanto sur scenejo

La 20an de novembro 1977 en Berlin renkontiĝis pli ol 120 esperantistoj el Berlin kaj najbaraj distriktoj por partopreni la IXan renkontiĝon de la berlinaj esperantistoj.
Post sonbenda mesaĝo de prof. Podkaminer (Leningrad), omaĝo al la forpasinta prezidinto de CLE, Rudi Graetz, kaj aŭskulto kaj diskuto de la raporto de la DLE-estro de Berlin, Ernst Schonert, oni spektis la duaktan komedion de la pola aŭtoro A. Cwojdzinski „La hipnoto". Rolis la profesia pola aktora paro (geedzoj): *Kalina Pienkiewicz* kaj *Zbigniew Dobrzynski.*
Ambaŭ aktoroj, kiuj multfoje ludis en polaj filmoj, en televido kaj sur scenejo, konatiĝis inter la esperantistoj pro la prezendato de la „Proksima nekonato" (A. Scibor-Rylski). „La hipnoto" (foto) estas ilia dua esperantlingva scenaĵo, kiun ili premieris dum la 62a UK en Rejkjaviko.
Altnivela prezento, bonega prononco, jen por multaj esperantistoj ĝi estis la unua teatraĵo rigardita en Esperanto.
Krome oni aŭskultis lumbildprelegon de D. Blanke pri la 62a UK en Rejkjaviko. La partoprenintoj akceptis rezolucion kontraŭ la neŭtrona bombo.

★

VESPERO PRI ENDRE ADY

En 1977 100-jariĝas la naskiĝo de la fama hungara poeto Endre Ady, kiu kreis novan hungaran revolucian poezion. Hungara Esperanto-Asocio pro tio forte engaĝiĝis prezentante la verkon de Ady al la eksterlandaj esperantistaj publikoj. Tiel okazis la 14an de decembro 1977 en la Hungara Kulturcentro en Berlin vere perfekta prezento de la verko de la hungara lirikisto. En sia malferma salutparolado, la komuna aranĝo de CLE kaj la Centro, d-ro Lajos Kerekes, direktoro de la domo, alvokis al plua kultura kunlaboro peresperanta. La ĉefredaktoro de „Hungara Vivo", Vilmos Benczik, la kantistino Éva Für kaj la deklamantino kaj fortopiana akompanantino Judit Lak prezentis al la 40 ĉeestintoj erojn el la riĉa verko de la hungara klasikulo. Impresa filmo pri Ady (en la germana) kaj esperantlingva broŝuro disdonita al ĉiu rondigis la vere altkvalitan programon.

★

Kurso kun pola instruistino

Intensa perfektiga kurso okazis de 31-a de oktobro ĝis 5-a de novembro 1977 en Mellenbach, distrikto Suhl kun 35 partoprenantoj. La kurson tre sperte kaj sukcese gvidis s-ino Elvira Twardowska el Gdansk. Partopreno por la kursanoj estis senpaga.

„Trigroŝa Romano“

1. **Al niaj legantoj en nesocialismaj landoj**

   La „Trigroŝa Romano“ de B. Brecht por vi nur estas akirebla per viaj libroservoj aŭ rekte ĉe Bleicher-Verlags-KG, Postfach 70, Holderäckerstr. 14, D–7016–Gerlingen 1, FRG.
   (Informo laŭ peto de Edition Leipzig).

2. **Al niaj legantoj en GDR**

   „Trigroŝa Romano“ estas havebla pere de ĉiu librovendejo. Bv. ne sendi la prospekton en la nesocialisman eksterlandon, ĉar ĉiujn vendorajtojn en tiuj landoj havas la Bleicher-Verlag.
   Se estas malfaciloj, mendu ĉe Edition Leipzig rekte.

3. **Al la legantoj en socialismaj landoj**

   Vi povas mendi la romanon pere de via internacia librovendejo aŭ rekte ĉe la eldonejo
   Edition Leipzig, Postfach 340,
   DDR–701–Leipzig.



Koloran bildkarton pri la ŝipmuzeo en Rostock (tradicia ŝipo tipo „Paco“) produktis la ŝipmuzea estraro. Ĝi estas havebla ĉe CLE.

Peco kostas 20 pfenigojn.

*

Jugendseminar 1978

Vom 9. – 12. November 1978 findet im Heim des Kulturbundes in Bad Saarow ein Seminar der Jugendkommission des Zentralen Arbeitskreises Esperanto statt. Alle Mitglieder der Kommission sowie andere interessierte Jugendliche sind zur Teilnahme aufgerufen. Die Teilnahme am Seminar ist kostenlos. Voranmeldungen nimmt der Zentrale Arbeitskreis Esperanto (108 Berlin, Charlottenstr. 60) entgegen.

Doneck (USSR). *La 9an de oktobro 1977 en loka Esperanto-Klubo okazis kunveno de aktivuloj el kelkaj urboj de Donecka distrikto. Pri sia vizito al frata lando kaj la vastaj kontaktoj kun geamikoj el GDR rakontis Nikolaj Starodubcev. Geklubanoj kaj gastoj konatiĝis kun malgranda bildkarta ekspozicieto el GDR kaj ankaŭ kun tre multaj eldonaĵoj ricevitaj de germanaj amikoj. Finiĝis la kunveno per gajaj kantoj pri amikeco inter niaj popoloj.*

Kaj hodiaŭ ni sincere sendas al ĉiuj niaj geamikoj la plej korajn salutojn.

N. Starodubcev

*

Ŝanĝoj en la Junulara Komisiono

Forlasis en novembro 1977 Centran Laborrondon Rita Krips. Ŝi edziniĝis al civitano de Popola Jemena Respubliko, pro kio ni tre kore gratulas. Rita jam ekloĝis en Aden.

Prezidanto de la Junulara Komisiono elektiĝis Michael Lennartz (nask. 1955). Lia adreso: 172 Ludwigsfelde, Eschenallee 45.

*

Distrikta renkontiĝo

La 8-an de oktobro 1977 en Eisenach okazis distrikta renkontiĝo kun prelegoj pri la temoj „90 jaroj Esperanto“ kaj pri Esperanto kiel faklingvo. La partoprenintoj raportis pri siaj aktivaĵoj, honore al la 60-a jubileo de la Oktobra Revolucio. Ĉiuj ĉeestantoj omaĝis al la forpasinta prezidanto de CLE Rudi Graetz.

*

Medicinistoj renkontiĝis

La 12an de novembro 1977 en Berlin renkontiĝis 10 kuracistoj kaj medicinistoj laborantoj en Berlin por priparoli la estontan fakan peresperantan agadon.

Estas planate organizi 1978 grandan renkontiĝon kaj krome sisteme ekligi kontaktojn kun kolegoj el eksterlando.

Solvo de la krucvortenigmo

(El n-ro 85, p. 23 de H. Rothe[1])

Horizontale: 1. laboratorio, 7. multa, 9. sorto, 11. orgojla, 13. orda, 15. obeu, 17. por, 19. omo, 21. ina, 23. anas, 24. boli, 25. alo, 26. salat, 27. teror
Vertikale: 1. lampiono, 2. balo, 3. reag, 4. tiaj, 5. rura, 6. oportuna, 8. troa, 10. oleo, 12. oazo, 14. dron, 16. bril, 17. pasat, 18. rabot, 20. mala, 22. nito.

[1]) En „der esperantist" n-ro 85 ni erare nomis kiel aŭtoron s-ron Ŝtanura. Ni petas pardonon.

Ofertoj

— Dupaĝaj salutkartoj formato A 6 por kristnasko kaj novjaro po —,15 markoj haveblaj ĉe Hans-Jürg Kelpin, DDR—5211 Dienstedt, Rudolstädter Str. 3.
— Eseo pri Herder, aperinta en „Scienca Revuo", kiel represaĵo aparte ricevebla ĉe Oskar Stolberg, DDR—705 Leipzig, Riebeckstr. 37/47.

Helpo petata

— Mi ellaboras verkon kompendian esperantlingvan pri la estiĝo de la pacaj organizaĵoj kaj pacmovadoj kaj ties ĝisnuna evoluo tutmonda. Tial mi petas ĉiujn gekamaradojn kaj gepacamikojn prunti aŭ lasi al mi materialojn, dokumentojn k. t. p. (aŭ skribi pri travivaĵoj kaj datoj, kiuj ne estas dokumentitaj) pri ĉiu temo en nacia kaj internacia sfero, en lingvoj germana aŭ internacia (Esperanto). Koran dankon antaŭe!
Bonvolu sendi materialojn kaj indikojn al la adreso: MEM-sekcio GFR, p./a.: Roland H. Hegen, Schloßgasse 30, D—6731 Elmstein 2, Federacia Respubliko Germanio.
— Estas serĉataj iuj indikoj pri Hamann Hornig. Lia lasta adreso estas Leipzig N 24, Lazarus-Str. 16. Indikojn sendu al Otto Lauckner, 828 Großenhain, Robert-Blum-Str. 9.

Botanika vortaro

S-ano František Mlynář (563 01 Lanškroun, Králicka 689, CSSR) preparas kun kelkaj kunlaborantoj botanikan vortaron. Ĝi estos parto de verko kun nomenklaturo en E—L—A—F—F—R—Ĉ.
Kunlaboremuloj estas bonvenaj.

Grava artikolo de Peevski!

En „Scienca Mondo" 2/77 en la Esperanta kaj alilingvaj eldonoj, aperis grava artikolo de prof. d-ro Vasil Peevski el Sofio pri la temo „La scienco kaj la internacia lingvo". Jen la subtitoloj: La kreskinta rolo de la scienco /La multlingveco/Efektiveco de la informado/Internaciaj sciencaj kunvenoj/La partoprenantoj de la internaciaj kunvenoj/La personaj kontaktoj/Aliaj postuloj por unu internacia lingvo/La neŭtrala solvo/ „Artefarita" Lingvo.
La artikolo klare pledas por Esperanto. Ĉiu germano havigu al si ne nur la esperantlingvan eldonon, (la revuo „Scienca Mondo" estas abonebla ĉe CLE) sed ankaŭ la germanlingvan.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Argentinio

Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, **2000 Rosario,** dez. kor. k. germanoj p. ĉ. t., kol. germanlingv. revuojn

Bulgario

Instruisto-matematikisto, 35j., dez. kor. tutmonde: Nikola P. Nikolov, **5400 Sevlievo,** str. G. Dimitrov 142, ap. 14

ČSSR

Studentino, 19j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, sporto, filatelio: Daniela Ondrejková, ul. SNP bl. A/4, **917 00 Trnava**

GDR

Kuracistino, 37j., komencantino, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: D-ro M. Stübner, **13 Eberswalde-Finow 1,** Joh.-Dieckmann-straße 14

Dipl.-inĝ. dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. prec. turismo, ĝardenkulturo: A. Höpfner, 59 **Eisenach,** Stadtfelder Straße 57

Francio

Esperanto-Turismo/Syndicat d'Initiative, **34540 Balarne - les Bains,** dez. kor.

Dez. kor.: s-ro Leduc, 35 Ave N. D du lac-, 49000 **Angers**

Hungario

Lernanto, 13j., dez. kor. kol. pm, bk: Imre Valuska, **H-5502 Endröd,** Polanyi 60

Lernantino, 12j., dez. kor. k. geknaboj 10—14j.: Viktoria Horváth, **8100 Várpalota,** Schönherz Z. u. 2

Juristo, 32j., dez. kor. k. gejunuloj el GDR pri klasika muziko, sporto, kol. kol. bk: D-ro Attila Tikász, **H-4100 Berettyóujfalu,** József A. u. 5

Junaj fraŭlinoj (studentinoj) dez. kor.: Grete Cservenák (18j.), **H-1119 Budapest XI - KER,** Kondorosi ut. 14–16, V. Lepcsöház VII em. AJTO 29

Eva Golarits (16j.), **H-1119 Budapest XI - KER,** Fehérvári ut. 46.I./3

Eva Oszlánczi (17j.), **H-1116 Budapest XI,** Kondorosi ut. 14–16, IV, Lépcsö, V em Ajtó 24

Gestudentoj dez. kor. k. gesp. el GDR, bv. skribi al Orosz Intézet, **H-3301 Eger,** pf. 43

Kolombio

Dez. kor.: Luis Martinez, PO-kesto 6950, **Medellin** (26j.)

Rafael Serrano, PO-kesto 27953, **Bogota** (24j.)

Rumanio

Programisto dez. kor. k. esp. el GDR, kol. bk, diapozitivojn: Joan Vajda, str. Dupá Iniste, nr. 44, **R-2200 Brasov**

Sovetunio

Geesperantistoj (komencantoj k. progresantoj) dez. kor. tutmonde, bv. skribi al: Anatolo Ionesov, **703000 Samarkand,** ul. Sovetskaja 53

17j. studentino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Kátálin Kováĉ, Zakarp Raj. Beregovo, **Bereg SU-295514,** ul. Pobeda 295

27j. studento dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Jurij Petroŝeviĉ, **703003 Samarkand,** ul. Gagarina, projezd 2, dom 1, kv. 2

Sergei Martinov, **630004 Novosibirsk - 4,** str. S.-Schedrin 1–33, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

20 komencantoj, 12–17j., dez. kor. tutmonde: Palaco de pioniroj, str. Čeluskineev 46, **625 Tjumen**

Lernantino, 17j., dez. kor. tutmonde, kol. bk, insignojn: Aime Kalamus, **202900 Viljandi,** str. Laudtee 17–10, Estonio

Membroj de Iĵevska Universitata E-Klubo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm, insignojn: Larisa Vorbjova, **426000 Iĵevsk,** str. Marks d 403 loĝ. 51

15 novaj esperantistoj (16–30j.) dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, pm, bieretikedojn, esp.-revuojn: Endel Pajula, **202131 Viru-Jaagupi,** Rakvere rajoon, Estonio

---

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60.
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 108